# ILERA bulteno

INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ RADIOAMATOROJ

45a numero 1991 novembro

Redaktinto: Laszlo Matusinka HA7PW
Albertirsa Gyozelem 2 H-2730 Hungario

Kontoj

UEA:2856 UEA kontoj Bank Mees & Hope Rotterdam 25.52.89.804
DJ4PG: Hans Welling Pĉk 11211-509-Kln Germanio
HA7PW: ILERA OTP Cegled 851-011171 Hungario

Enhavo

Komunikaĵoj de la estraro....................2
76a UK - 1991 Bergen........................3
LA1ESP......................................4
Renkontiĝoj, kunvenoj.......................5
El leteroj..................................7
Sin prezentas G3ESP.........................8

==========================================

# Komunikaĵoj de la estraro

## N o v a j  m e m b r o j

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| 471 FA1PBR | Jean-C. Pacchiana | 43 rue du Borrego | Paris | F-75020 |
| 472 SP9UPX | Ireneusz Bratek | K.Pulawskiego 59/65. | Czestochowa | PL-42200 |

### Korektoj, ŝanĝoj

FE1MJV havis ILERA- numeron 415 kaj G00XT havas la numeron 458. Tiujn mi intermiksis en la antaŭa numero. Pardonon! (HA7PW)

La nova adreso de OZ4TK-Torben: (IL-090)Jan van Puyenbroecklaan 75 2900 Schoten Belgujo.

Vilmars (IL-358) ricevis novan voksignon: YL2GVK kaj entreprenis la taskojn kiel landa reprezentanto en Latvio. Multajn sukcesojn!!!

### ILERA- estraro

En la lastaj tempoj novaj landaj reprezentantoj komencis la laboron, nia estraro plivastiĝis. Jen la listo pri la membroj:
Prezidanto: UW9YE
Vicprezidanto: DJ4PG
Sekretario: HA7PW

| | | | |
|---|---|---|---|
| CT1CGE, | EA5 DR, | F 9 ED, | G 0EXS, |
| HL1CAN, | I 2YLG, | JA1FXZ, | LY2BFN, |
| LZ2 LI, | OE3FNN, | OK2 LS, | PA3DFZ, |
| PT2 CA, | SM5DAD, | SP6VGZ, | UB5WDT, |
| W 2CIL, | Y23 HE, | YL2GVK, | YO5OCP, |
| 4Z4 LX. | | | |

### Esperanto- diplomo

Nian diplomon registris amerika organizaĵo 'Awards,honors,pri[illegible]. Ankaŭ K1BV -mondfama diplomopublikanto- petis de ni informojn kaj modelon por publikigi ĝin.Espereble en la sekva eldonaĵo de 'Awards Reference' jam aperos ankaŭ niaj diplomo-kondiĉoj kaj la bildo pri tiu. Certe la interesiĝo altiĝos inter neesperantistaj radioamatoroj.

### Informeroj

* F6CLV ricevis ĉijare la diplomon pro la plej multnombraj esperant-lingvaj kontaktoj en 1990!

* HA7EA Feri gravan helpon donis al ni: presis adres- vinjetojn por ĉiuj landaj reprezentantoj!Dankon!

* UZ0AXX preta por kontakti kun aliaj stacioj per paketradio.

---

La 14- 15an de marto 1992 okazos 'Printempa Konkurso'!!!
Regulojn vi trovas en la 41a numero de Bulteno. Partoprenu!

*********************

La 77a Universalan Kongreson arangôs Aŭstrio en Vieno.
Jam pluraj samideanoj signis, ke ili partoprenos en la laboro.
ĈU VI VENOS?

# 76a U K – 1991 Bergen



Partoprenintoj (de maldekstro): 1.Jugoslava s.no 2.OH1BI Risto 3.YU4KG Gradimir 4.F6ILR Jean- Jacques 5.LA1MG Arnold 6.OH Veikko 7.SM3IIG Borje 8.W2GTX Bill 9.YL2GVK Vilmars 10.W2GLB Phyllis 11.HA1UD Imre 12.(Nekonatulo) 13.Y27FD Irene 14.LA5KD Bjorn 15.DJ4PG Hans 16-17. JM1UYK,JO1JAM,JR1JRJ (du el ili.Pardonon!) 18.F6EBE Lionel 19.SM-7532 Inger 20.Y23HE Wolf 21.SM5BIS Sten 22.SM5DAD Kaj 23.TF-SWL Karl.

Sur la bildo ne videblas, sed ĉeestis: I2YLG Ginevra, JA1FXZ Jojo, JL1FSG Nakazima, LA5RQ Marco, LA5DF Svein, LA9AEA Jon, N6COI Farrell OH- Pirjo, OZ4TK Torben, SM- Jarl, SM- Wim, DF7TZ Karl kaj ZL2AFQ Jim.



Raporto kaj bildoj de SM5DAD Kaj

Hans DJ4PG montras al la japanaj amatoroj la 'ŝlosilon' por la malfacile atingebla ejo de LA1ESP. Irene Y27FD la ŝnuron tenas, kies alia fino estas fiksita en seĝo. Kiam oni tiris la ŝnuron, la seĝo renversiĝis, faris bruon sur la planko, kaj la operatoro aŭdis kaj iris malfermi la pordon. Simple!

* * * * * * * * * * * * * *

# L A 1 E S P

G3ESP Walter

En Bulteno 44 mi legis la vortojn ´LA1ESP - Dum la tuta tempo de la kongreso laboris la kongresa stacio´. Ĉu vere?
Dum ĉiu tago de la kongreso, je diversaj horoj, per diversaj bendoj mi aŭskultis, sed ne aŭdis la stacion certe. Unufoje mi kredis ke eble ĝi estis tie. Mi sendis mian voksignon. Iu diris ´atendu´. Mi atendis, atendadis, vane.
Pro kio mi ne aŭdis ĝin? Mia stacio ne kulpas. Mi kontaktis alian LA- stacion (ne- Esp.).
Ĉu estas vere, ke LA1ESP ´dum la tuta tempo de la kongreso´ laboris?


SM5DAD Kaj

Nun mi rakontos pri la komenco de la aktivecoj de la kongresa stacio. Eble mi antaŭe menciis, ke mi forte premis la demandon, ke la stacio funkcios en simple atingebla ĉambro, bone videbla de la aliaj kongresanoj - por fari bonan reklamon pri amatora radio al ili.
Tiu aspekto ne estis respektata, aŭ eble ne estis bone plenumigebla. Do: ĉambro sur dua etaĝo, atingebla dum feran sekurpordon kaj maldikan spiralŝtuparon. Signoj mankis. Nenion estis menciita en la kongresa libro ke ie amatora radio funkcias.
Tamen - la Bergena Grupo indas laŭdon pro sia bona laboro!
Unue: ili transprenis la taskon respondi pri la stacio rilate al ´Teledirektoratet´ kaj faris (kiel mi, unue) demandon pri la permeson kaj la voksignon kaj eĉ pagis la 130 kr. kiuj kostas la permeson.
Ili disponigis al ni transricevilon Kenwood 720 A kaj antenan agordilon, telegrafian aparaton kaj Fritzel Windom antenon. Ili muntis la antenon sur la domo kaj pretigis la stacion dumsabate tiel, ke ni povis komenci uzi ĝin jam en la komenco.
Per 145,750 (ripetilo) kaj 145,500 ni tenis internan komunikon, tio bone funkciis.

Y23HE Wolf

Okaze de 76a UK funkciis kongresa stacio LA1ESP de la 27a de julio ĝis la 2a de aŭgusto 1991.
Ni uzis 100 vatan sendricevilon kaj Windom-antenon. Sigve LA1HCA, kaj aliaj lokaj tradioamatoroj helpis elstarigi antenon kaj prepari la stacion. Tuj ni vokis en 14.266 kHz kaj kontaktis Henriko, F9ED, kiu laboris tutan semajnon kiel FF6ESP.

Bedaŭrinde nia sendsignalo in-



Ĉe la stacio HA1UD kaj Y23HE

termiksis en radioprogramon de norvega studenta radiostacio. La sendstacio nur estis unu etaĝo super ni. Ankaŭ la partoprenantoj de esperantologia konferenco en la najbara salono, [miris] kiam la voĉo de Ginevra I2YLG estis aŭdebla per laŭtilo. Do ni nur povis uzi la stacion de tempo al tempo.

Ni havis 138 kontaktojn (73 en Esperanto) kun 30 landoj (13 en Esperanto). Ĉe la stacio servis 10- 30 de ĉeestantaj Esperanto- radioamatoroj. Ili estis DJ4PG (4 QSO), F6EBE (14), F6ILR (8), I2YLG (8), JA2FXZ (2), SM3IIG (1), SM5DAD (4), YL1WJ (4), Y23HE (88) kaj Y27FD(5).

Ĉefe Hans DJ4PG kaj Irene Y27FD montris por la vizitantoj LA 1 B paketradion. Ni laboris en 144, 21, 14 kaj 7 MHz. Kiu deziras havi konfirmkarton por Esperanto- diplomoj povas sendi al Y23HE. La konfirmado okazos per kopio de taglibro.

Malgraŭ, ke estis kelkaj malfacilaĵoj oni povas diri la kongresstacio estis sukcesa. La sekva kongreso okazos de 24a de julio ĝis la la a aŭgusto 1992 en Vieno, certe ankaŭ kun bone funkcionta stacio!!!

§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§

En la nomo de la estraro mi esprimas grandan dankon al ĉiuj samideanoj, kiuj partoprenis en la organizado kaj funkciado de la kongresa stacio helpinte la rezuldonan funkciadon de LA 1 ESP!"

HA7PW

§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§

## Renkontiĝoj, kunvenoj

la Renkontiĝo de Nordia Sekcio
Vasteras la9-10an de marto 1991

ILERA, Norda Sekcio

Frue en la sabato Stig SM5CS antaŭpreparis la manĝaĵojn kaj 'bonvenkafo'-n. Alvar SM5IFT kaj Borje SM3IIG baldaŭ venis, poste Inger SM4-7537 kaj Goran SM4RGE sekvis ilin. Fine Larsowe SM5AK kun la klubsekretario Wim fermis la vicon de la lokaj alvenintoj.

Tri norvegaj kolegoj promesis veni, ni scivoleme atendis ilian vokon sur la 7a kanalo. Aŭdila voksigno: SM5/LA1MG/M! Kun ĝojo ni informiĝis ke ili venas kvarope: Arnold LA1MG, Marco LA5RQ Jon LA9AEA kaj Bjorn LA5KD.

Larsowe tenis la bonvensalutparolon, transdonis flageton kaj komenciĝis la kunveno. Multe estis priparolita per Esperanto, tiom multe ni interparolis, interbabilis kaj interkonatiĝis, ke ni ne havis multe da tempo por uzi la luksan radiostacion - nur 6 QSOj dum du tagoj kun ok amatoroj - ĉu 'malrekordo'? Inter la temoj estis: kontakteblecoj, 2m-a rondo, pri la 76a UK - precipe LA1ESP, paketradio, filmfarado...

Ni sendis salutojn per paketradio de Stig. Li uzas PC kaj tiel havas multajn eblecojn. Alia paketradioisto estis inter ni Arnold.

La unua renkontiĝo de Nordia Sekcio donis bonajn rezultojn en multaj temoj kaj esperebleble fundamentis tradicion.

(Baze de la artikolo de) Kaj
SM5DAD

Kunveno de GEPRAF
Nazelles-Negron 1991

Partoprenis: F6EBE, F6AXF, FD1NAQ, F6ILR, F6CLV kaj C. Rouget.

Lionel F6EBE bonvenigis la partoprenantojn kaj legis la leterojn de la eskuzitoj.

Kleber F6AXF klarigis la bonan financan situacion, legis la liston de nia anaro (25 membroj).

Ni parolis pri diversaj temoj: bultenoj, rondoj (pluraj venas malfrue), funkciado de la 40 metra rondo, la kunlaboro inter REF kaj GEPRAF, membrokotizo-enpagebleco al ILERA.

Fine ni decidis danki al Henri F9ED pro lia granda laboro kiel sekretario de GEPRAF, esperante ke li daŭrigu!

Jean- Jaques F6ILR

Pola renkontiĝo
Jarkowice majo 1991

SP9FSL, SP2FXI, SP6VGS, SP5LKL kaj lia edzino, SP-0215/JG, SP-2313/EL, SP9-4570/JG kaj lia filokolektiĝis la 3an de majo.

Dum la tritaga kunveno laboris la stacio SP6PAX/6. Ni faris dekkelkajn kontaktojn per la 30 vata sendilo kun polaj kaj ĉehaj radiamatoroj koniginte nian kunvenon al ili.

Ni diskutis pri la movado de esperantistaj radioamatoroj en Pollando, fiksis rendevuon: la duan kaj kvaran lundon sur la 3766 kHza frekvenco, la gvidanto estos SP5LKL. Post redaktado de vortareto ni faris ekzemplojn pri la kontaktoj esperanlingve.

Fine ni interkonsentis fari similan kunvenon en la venonta jaro!

Gregoro SP6VGS

30a FIRAC Kongreso
Blankenberge 1991




Inter 19a kaj 21a de septembro en la nordmara banloka urbo Blankenberge (Belgio) okazis la kongreso de Internacia Fervojista Radioamatora Federacio. La kongreson ĉeestis 200 gekolegoj el 12 landoj. ( DL,F,G,HA,HB,I,LA, LX,OE,ON,PA,YO.) Unuan fojon aperis dum la kongreso hungaraj radioamatoroj, nome HA1UD kaj HA1VQ

Dum la oficiala kunsido PA3CXM Niek, la prezidanto de la Federacio salutis la partoprenantojn, aparte la hungarajn kaj la hungarlanda prezidanto HA1UD esperantlingve salutante transdonis la bondezirojn de ILERA, en la espero, ke inter du organizaĵoj elformiĝos kunlaboro. La kongreso elektis novan estraron por unu jaro: prezidanto LA6DU, vicprezidanto G4GNQ, sekretario PE1MIZ, kasisto HB9MEC.

La sekvonta FIRAC kongreso okazos en aŭstria urbo Ossiach/See.

En la kadro de la kongreso okazis akcepto ĉe la urbestro, unu- kaj dutaga ekskursoj al la ĉirkaŭaj urboj kaj regionoj, filmprezentado pri la konstrulaboroj de la kanalo La Manche (fervoja tunelo).

La kongresa radiostacio ON7BR efektivigis kontaktojn kun ĉiuj kontinentoj de la mondo. La partoprenantoj ricevis bone redaktitan kongreslibron kaj specialan insignon kun la voksigno.

Kiel dum ĉiuj internaciaj kongresoj (escepte esperantistaj) ĉeestis lingvaj malfacilaĵoj, la tradukado forprenis multan tempon.

Imre HA1UD

# El leteroj

Jean- Jacques F6ILR Ekspedicio sur la Monto Blanka

De la 1a ĝis la 23a de aŭgusto okazos radioamatora ekspedicio sur la plej alta eŭropa monto. Estos uzata la voksigno TV9CEE, kie CEE signifas Ekonomia Eŭropa Komunumo. Ĉiujn eblajn moduladojn povos esti uzataj.

Mi partoprenos tiun ekspedicion, kiel respondeculo pri elsendoj en malrapida televido (SSTV). Ĉiujn esperantlingvajn demandojn bonvolu sendi al mi: Jean-Jacques Noel, Appt 16, rue d'Aquitaine, F-41500 Mer

Sjoerd PA3FLC
Mi lastatempe ne multe aktivas radie. Multe mi okupiĝas pri mia studado. Ankaŭ pri elektroniko mi preskaŭ ne hobie okupiĝas kvankam mi aĉetis bonegan osciloskopon.

Franta OK2LS
Antaŭ semajnoj mi jam ricevis novan TRXon el Svedio de mia amiko. Do mi jam estos regule sur la IL frekvencoj.
Vere OK2MI estis tre aktiva RAE antaŭ dua mondmilito kaj iom post la milito. En la postmilitaj jaroj li perdis la licencon laŭ politikaj situacioj en nia lando. Kelkaj jaroj post la milito mortis, 70 jaraĝa. Li aktive laboris per morsa kodo ankaŭ kun G3ESP!

Barry G0EXS
...Mi konkludas, ke spite mia entuziasmo por varbi novajn membrojn por ILERA, estonte mi intencas pli singarde antaŭeniri - t.e. konsili almenaŭ iom da lingvokapablo pri Esperanto antaŭ aliĝi al ILERA - mi supozas ke vi konsentas je tio!
En la ĵurnalo 'Radio Communication' aperis artikolo pri G0NUE kaj liaj gestudentoj, kiuj funkciigas lernejan radiostacion.

Henri F9ED
DL1GBZ = IK2RMZ. Nia amiko Martin nun loĝas kaj laboras en Italio apud la svisa landlimo. Adreso: Martin Zurn Via Brughiera 2. I- 21014 Laveno Mombello (Varese). Sed por skribi al li pli rapide estas sendi korespondaĵojn al: Martin Zurn Fermo in posta/Poste restante. CH 6988 Ponte Tresa (Ticino) Svizzera. Li dezirus regulajn skedojn kun ni...

Wolf Y23HE
Ĉiujn Y2- Y9 voksignojn oni ŝanĝas al DL- voksignoj. La duonon jam ŝanĝis. Do ĝis la 31a de decembro 92 malvalidos la lastaj Y-voksignoj.


---

Ĉu vi povas/povis sendi la taglibron de ILERA Konkurso jam la 18an de novembro al via landa reprezentanto aŭ rekte al Hans DJ4PG???

---

Al ĉiuj niaj membroj ni deziras agrablan Kristnaskfeston kaj feliĉan novjaron - 1 9 9 2!

Volkert
3/6344



S i n

p r e z e n t a s

G 3 E S P

Haus
46469

F+K

Mi naskiĝis malfrue en 1919 kaj kreskadis paralele kun la radio. En mia menso mi ankoraŭ vidas nian unuan ricevilon: ĝi estis granda meblo kun ekstere brilantaj tuboj!Mia unua propra ricevilo estis kuba skatolo enhavanta grandan bobenon kaj ekstere galenokristalon. En tiuj foraj tagoj tre multaj homoj kunmetis radioricevilojn, ankaŭ mia patro, kaj pro tio mi interesiĝis, fabrikante simplajn aparatojn kun unu-du tuboj. Mian unuan sendilon mi kunmetis kiam lernejulo kaj oni ricevis mian voĉon ĉe la kontraŭa flanko de scienca laborejo! Ĉirkaŭ la sama tempo en 1937 amiko instigis ke mi lernu Esperanton, kaj tion mi facile faris, ĉar en mia lerneja vivo mi jam studadis la francan, latinan, malnovgrekan kaj iome germanan lingvojn.

En 1939 komenciĝis la dua mondmilito, dum mi studis fizikon en kolegio. Je la fino de 1941 oni vokis min al laboro en registara eksperimentejo pri armea radio. Unue mi esploris mallarĝan f-m, kaj post 1943 mi esploris kaptitajn aparatojn, precipe de la germana armeo, kaj tiel mi lernis multon, kaj plibonigis mian scion de tiu lingvo.

En 1947 mi eklaboris kiel instruisto en gimnazio, kaj finis mian karieron (iom frue) en 1978 ĉe teknika kolegio. En 1948 ne necesis por mi ekzameno pri radio, tamen mi devis sukcesi en morskodo kaj farinte tion mi akiris mian sendpermesilon. Mi elektis la voksignon G3ESP, esperante komuniki per nia internacia lingvo, tamen sen multa sukceso. Mi ja renkontis Ken - G4MR - kaj iom poste fariĝis frua membro de ILERA. Antaŭ dek jaroj, tamen, mi eksiĝis, ĉar ĝi ŝajnis al mi esti ne tro sukcesa. Tamen pasintjare Barry, C0EXS, la brita nova landreprezentanto influis min realiĝi, kaj Laci trovis mian antaŭan numeron 030.

Jen la mallongigita vivohistorio de o. m. (maljuna viro!)

Walter

Ĝis (re) aŭdo!

---

La sekva numero aperos en aprilo

---

Enhavo:

La rezultoj de la konkurso 1991.
Sin prezentas W2CJL Ed Lindberg
El leteroj
Renkontiĝoj
Informoj pri la 77a UK en Vieno.
Komunikaĵoj de la estraro.

---

La redaktinto atendas viajn informojn, raportojn, opiniojn. Skribu! 73!

---

Script 91.347